ESPERANTO

MONATA GAZETO DE E-HANDIKAPULOJ

INFORMILO

10

OKTOBRO 2018 Kol. 402/34

xxxx

kongresejo. Temas pri teatro fondita en la jaro 1890. La inaŭguron ĉeestis ambasadoroj el Litovio, Pollando kaj Slovakio. Krom la kutimaj bonvenigaj salutvortoj de la prezidanto Mark Fettes, de unuopaj landaj reprezentantoj kaj de aliaj gastoj, estis legita salutmesaĝo de Audrey Azoulay, ĝenerala direktorino de Unesko. Festparolis ankaŭ la pranepino de L. L. Zamenhof s-ino Margareta Zaleski Zamenhof. La bankedo kaj la balo okazis en la kultura centro de la kvartalo Belém, 10 km for de la kongresejo.

Post la alveno de la kongresanoj, la sabata vespero estis dediĉita al la Movada foiro, kie diversaj E-asocioj povis ekspozicii siajn objektojn kaj varbi al siaj renkontiĝoj kaj aliaj aktivaĵoj. Ĉi-foje la loko ne estis tre taŭga por tiu celo. Malmulte da spaco kaj varmegeco en la halo ne faciligis kontakton kun la ekspoziciantoj.

La kongresa temo estis “Kulturoj, lingvoj, tutmondiĝo: Kien nun?” Kiel kutime, la kongresaj programeroj estis superŝarĝitaj je diversaj prelegoj, diskutoj kaj ne eblas en unu paĝo priskribi ĉiujn. Komitatkunsidoj, forumoj, Akademio de Esperanto, diskutoj pri la kongresa temo, fakaj kunsidoj, belartaj konkursoj, aŭtoraj duonhoroj, junulara konkurso pri publika parolado, libroj de la jaro, legantoj de Esperanto, CO respondas, paroligaj lecionoj, KER-ekzamenoj, prezento de diversaj movadoj, aŭkcio kaj artaj aranĝoj estas nepraj dumkongresaj programeroj.
Al tio aldoniĝis multaj aliaj interesaj prelegoj kaj atelieroj.

Okazis prelegoj pri Portugalio, pri botanikaj specioj, pri mitaj historioj, pri renovigebla energio, pri lisbonaj tramoj, pri malsameco de la lingvo en Brazilo kaj en Portugalio, eblis sekvi portugalan lingvokurson. Oni parolis pri perspektivoj por Eŭropa Unio, pri sukcesoj kaj perspektivoj en planedo-scienco. La kongresa kuriero TAĴO NIA informis pri ĉiutagaj okazaĵoj. Riĉa estis la propono al diversaj ekskursoj.

Okazis antaŭkongresaj kaj post-kongresaj ekskursoj. Tiamaniere esperantistoj povis ekkoni plurajn urbojn kaj belajn lokojn en Portugalio. La vojo de Lisbono al Porto estis parfumita de eŭkaliptaj arbaroj. La ĉiutagaj ekskursoj ebligis promenadon en la urbo. Esperantistoj videbligis sin per kongressako.
La plej ŝatata merkreda ekskurso direktiĝis al *Sintra.* La oferto de UEA estis rapide elĉerpita. Tamen al tiu loko alvenis pluraj individuaj grupetoj aŭ soluloj. *Sintra* situas proksime al Lisbono en la nacia parko *Serra de Sintra.* Tie sur verdaj montetoj aperas pluraj vidindaj kasteloj kaj palacoj kun eksterordinara arkitekturo kaj belegaj ĝardenoj.

Granda plezuro kaj neforgesebla sperto por kelkaj parto-prenantoj estis flugado per balono. Por tio necesis vekiĝi frumatene. Aprezata estis tre malmultekosta manĝaĵo en la universitata restoracio kun afabla servistaro. Varmis en Lisbono kaj la temperaturo tiutempe altiĝis ĝis pli ol 40 gradoj en la tuta Iberia duoninsulo. Ne mirinde, ke la esperantista piedpilk-teamo malgajnis kontraŭ spertaj lokuloj je 1: 7.

Dum la kunveno pri venontaj kongresoj prezentiĝis Lahtio (Finnlando) por la jaro 2019 kaj Montrealo (Kanado) por la jaro 2020. La kutimaj klerigaj lundaj programeroj pro intereso rapide plenigis la koncernajn salonojn. Dum la tuta kongresdaŭro ni kleriĝis en prelegoj de IKU, ISAE, AIS kaj aliaj. Malfacila estis elekto inter tiom da programeroj.

La ĉi-jara UK estis riĉa kaj varia laŭprograme, ĉiu povis trovi por si ion interesan. Okazis diversaj fakaj kunsidoj kaj allogaj prezentadoj, ekspozicioj, muzikaj posttagmezoj, spontanea gitarludado kaj kantado en la koridoro kaj vesperaj koncertoj kun famkonataj esperantisto-artistoj. Ĉe la fino la infanoj de la kongreseto venis saluti nin.
Unuvorte, la kongreso estis ĝuinda kaj necesas danki al la organizantoj kaj al iliaj kunhelpantoj pro ĝia sukceso.

Liba Gabalda

La 103-a E-kongreso en Lisbono tra miaj okuloj

Antaŭtagmeze, la 28-an de julio 2018 nia ĉeĥa Esperanta grupo feliĉe surteriĝis en Lisbono. Kiam ni trairis la halon de la aerodromo, ni vidis eĉ ne unu bonvenanton. Neniu deĵoranto, kiu donus iajn informojn, kien iri. Nenia afiŝo de la kongreso, neniu informa servo, eĉ ne unu verda steleto. Ĉu ni vere estas en la urbo de la 103-a UK?
Translokiĝo al la kongresejo: granda avantaĝo estas tre proksima stacio de metroo. Sed problemo – kiamaniere aĉeti vetur-

bileton, kiom ĝi kostas, kiamaniere pagi la sumon? Nur dank´al niaj perfekte angle parolantaj grupanoj, kiuj helpis traduki el la angla, franca kaj germana lingvoj, ni povis ĝui komfortan subteran veturon kaj uzi ilian metroon. Poste vere ĉiutage ni povis utiligi tiun komfortan subteran veturon. (Mirigis min ĉiam ne tro multaj vojaĝantoj en la metroo.) Sukcese ni trovis la kongresejon, la Juristan universitaton. Sur ĝi jam estis videbla emblemo de la UK kaj ankaŭ du flagretantaj flagoj kun signo de la 103-a UK. Jes, ni troviĝis sur la ĝusta loko, kien ni celis.

La halo de la lernejo estis jam plenplena de multaj homoj (bedaŭrinde neniu konato). Nia akcepto pasis sufiĉe rapide. Ni ricevis ŝtofan mansaketon kun la emblemo de la kongreso. La saketo enhavis diversajn kongresajn materialojn, inter ili ankaŭ la necesan „kongresan libron“, ene kun fotoj de la estraro de UEA (la plej bela viro estas Emílio Cid, apud la vere simpatia Mark Fettes, prezidanto de UEA), plua enhavo de la kongresa libro - informo pri unuopaj kongresejoj (ekzemple koncertoj okazis aliloke ol en la ĉefa konferencejo, ankaŭ la solena inaŭguro de la UK), informo pri Lisbono, vere bunta laŭtaga programo kaj prezento de la unuopaj kongresaj programeroj, la nomaro de la aliĝintoj. Laŭ la kongresa libro partoprenis entute 1525 esperantistoj el 73 landoj.

Bone, la unua paŝo, la trovo de la kongresejo, estis sukcesa. Kaj nun – serĉado de nia loĝloko. Sur la urboplano estas ĉio klara kaj facila, ne tiel sur la stratoj. Kun peza valizo, dum varmega

vetero … tamen mia amikino Vlasta, kiu bone orientiĝas en mapo kaj ankaŭ en la realo, sukcese trovis nian pensionon. Malgranda ĉambreto kun 2 litoj, 2 noktoŝranketoj, 1 malgranda seĝeto kaj unu stanga robopendilo. Komuna kuirejo, banejo kaj necesejo en koridoro. Sufiĉa komforto.
Post la movada foiro ni ankoraŭ promenis, trarigardante la belan, puran urbon kun interesaj stratoj, kies domoj estas ornamitaj per kaheloj, kun multaj grandaj statuoj, belaj parkoj...

Dimanĉe antaŭtagmeze okazis la solena inaŭguro: bonvenigaj vortoj de la estraro, alparoloj de diversaj homoj, unufraza saluto de 73 reprezentantoj de siaj landoj. La Esperanta himno (por mi estis tre kortuŝa momento). Solena komenco de la grava okazaĵo por la esperantistaro.

Koncerne la kongresan programon – dum la postaj tagoj mi kun Vlasta plej ŝate vizitadis paroligajn lecionojn (kiamaniere oni instruas la ligvon?- Interese, gaje, bonege!), prelegojn pri Portugalio, koncertojn (en la haloj estis sufiĉe agrabla aero kaj favora temperaturo). Ni multe piedpromenis tra la urbo kaj fine de nia restado ni konstatis, ke mi faris ĉirkaŭ 60 kilometrojn kaj Vlasta 80! Ni ne ĉiam iradis kune.

Merkrede okazas ekskursoj. Tiun nian, pli malmultekostan ol de UK, eminente organizis nia Lenka Angelová. Per buso, kun simpatia slovaka ĉiĉeronino, ni vizitis la malnovan urbon Sintra, iaman rezidejon de la portugalaj reĝoj, sur alia loko ni alpaŝis eĉ bordon de la oceano kun ĝiaj malvarmaj, abruptaj ondoj, ni

vizitis Cabo da Roca – la plej okcidentan lokon de Eŭropo. Ni havis tagmanĝon kun antaŭmanĝo, poste rostitan porkidon, frititajn terpomfingrojn kaj legoman salaton, akvon, bieron, vinon, kafon kaj dolĉaĵon.
Posttagmeze ni vizitis alian vidindan urbon – Cascais. Post promeno tra la urbo ni revenis en Lisbonon ĉirkaŭ la 18-a horo.

La ceteraj tagoj jam forkuris ege rapide. Krom aliaj travivaĵoj – mi revidis mian longjaran germanan skribamikinon – vere kortuŝa renkontiĝo. Vendrede okazis Internacia arta vespero – bela, amuza. La kongreso finiĝis per solena fermo. Finnaj gesamideanoj invitis la ĉeestantojn partopreni la venontan UK 2019 en Lahti, Finnlando.
Ni aŭskultis belegan kantadon de Esperanto-Ĥoro, sekvis adiaŭaj vortoj kaj la fino, adiaŭo, disiro.

Leonarda Chaloupková

UK en Lisbono.

Ĉar ni forflugis al Lisbono jam nokte, mi devis en Prago tranokti ĉe mia filo kaj frumatene veturi al la flughaveno. En Lisbono atendis nin ne nur varmego, sed ankaŭ elrevigo pri loĝado, ĉar nia hotelestro fuĝis kun nia pagita mono kaj ni ne havis eblecon por tranokti. Feliĉe post kelkaj horoj ni ricevis simplan loĝejon en alia loko. Nur post 2 tagoj ni atingis veran hotelon. Dum la kongreso mi renkontis pluajn malnovajn geamikojn, kio denove plibonigis mian humoron. Ĉi-jare mi ne aŭskultis prelegojn, sed precipe koncertojn. Okazis entute 17 diversaj koncertoj. Mi vizitis 12 el ili. Tamen okazis neniu teatraĵo.
Trarigardo de la urbo estis malfacila pro ega varmego.

Por la lasta tago mi elektis promenon al la monteto Monsanto, de kie mi supozis belan vidon al la urbo. Kvankam mi atingis "Pista de bona vista" (vojon kun bela elrigardo), ĉie mi trovis nur malfacile travideblan arbaron kaj en la pinto de la monteto troviĝis milita areo. Mi revenis al mia hotelo ege lacigita.



Matene estis 39°C kaj post-tagmeze eĉ 45°C. Feliĉe en la hotelkorto troviĝis ankaŭ banbaseno. Kiam mi tuj vizitis ĝin, neniu alia estis tie. Do mi rapide sen-vestiĝis ĝisnude kaj enpaŝis en akvon. Kia ĝojo! Tiu ĉi duonhora naĝado (aŭ pli vere banado) fariĝis mia plej bela momento el la tuta kongresa semajno. Karel Votoček

Travivaĵoj de Jindřiška en Portugalio

Ĉar mi jam estas ne „la plej juna“ inter la kongresvojaĝantoj, mi preferas vojaĝi kun la grupo de esperantistoj kaj inter ili ĝui la grandan eventon, pri kiu mi volas rakonti, ĉar mi spertis tion ankaŭ dum la Universala kongreso en Lisbono 2018.

Jam la unuan tagon post la alveno en metroo mi trovis mian korespondanton, la germanon Bernhard, kiun mi ne vidis dudek jarojn. Li tuj invitis min post la Nacia vespero en la restoracion por manĝi kaj babili. Ĉar mi ne vidis problemon reveni per metroo al la domo, kie ni loĝis hieraŭ, mi konsentis. Antaŭ la deka kaj duono ni envenis gastejon proksime de haltejo de la metroo. Gaje ni manĝis kaj parolis kun kelneroj – do „babilis“.

Ni havis informon, ke la metroo funkcias ĝis la unua nokta horo. Bernhard ne sukcesis ricevi informon, kie okazos la bankedo kaj balo, ĉar kelneroj sur la mapo ne trovis Belem kaj ne sciis, kiel tien veturi. La pli juna kelnero ĉiam uzis anglan „sekju“ (thank you), ni petis lin diri portugalan „obrigado“. Subite mi vidis, ke la gastejo estas sen gastoj, pli maljuna kelnero jam havas civilan veston. Do ni pagis kaj foriris.



La placo estis preskaŭ senhoma. Bernhard post du haltejoj eliris el la vagono kaj mi restis kun du pasaĝeroj kaj du policistoj en la vagono sola. Ĉe la sekva haltejo ĉiuj eliris kaj mi restis sola ĝis mia haltejo Laranjeiras. Irante tra kelkaj ŝtuparoj mi vidis neniun. Ĉe la enirejo mi elmetis papereton kun unu litero kaj kvin ciferoj kaj kun laŭte batita koro mi provis malfermi la ĉefpordon de la ok-etaĝa domo. Mi sukcesis nur okaze de la dua provo.
Per la lifto mi senprobleme atingis la kvinan etaĝon. Sed poste, ve! Koridoro kaj vico da pordoj. Mi havis la ŝlosilon, sed de kiu pordo? Mi forgesis. Mi provis meti la ŝlosilon en kelkajn pordojn, sed sensukcese. Mi pensis, ke la tranokto sur planko eblas, ja mi ne dormis dum la pasinta nokto… Tamen, mi kuraĝis bati hazarde iun pordon (ĉe profunda doma silento).
Ŝajnis, ke miaj amikinoj estis eĉ pli kontentaj ol mi, kiam ili malfermis ĝin kaj vidis, ke mi bonstate kaj feliĉe revenis.
Krom tio, ke mi preskaŭ forgesis la valizon ĉe giĉeto dum la aĉeto de metroobileto, miaj amikoj travivis kun mi alian sperton, kiun ili perfekte solvis.
Ĉe la bordo de Atlantika oceano tio ĉi okazis:

Neimageble forta vento kaj arda suno, la avido lavi piedojn en mara akvo, kie jam multaj amikoj malsekigis la pantalonon en ŝaŭmaj ondoj, min instigis kuri tra varmega sablo gustumi Atlantikon. Mi en ĉapelo firme fiksita sur la kapo, kun ŝuoj kaj dorsosaketo en mano, alkuris kontraŭ ondojn.

Sed la naŭa ondo venis alta kun forta vento kontraŭ mian ĉapelon. Mi ne sukcesis teni la ekvilibron kaj mi falis sur la dorson, la akvo transiris min. Amikaj viraj manoj de du flankoj min tuj starigis. Post kelkaj momentoj senvestigis min iaj virinaj manoj kaj vestigis min per fremda ĉemizo kaj anstataŭ jupo nodis silkan plejdon. Aliaj manoj purigis miajn krurojn de sablo. Jes, mi kaŭzis gajan etoson kaj ni ĉiuj ridis ankoraŭ plurfoje. Kaj ne nur pri mi …

Jindřiška Drahotová

Mia unua kaj „lasta“ kongreso

En mia vivo mi havis relative multe da interesoj kaj hobioj. Do, kiel sesdekjara, kiam mi sentas, ke mia vivo komencas malrapidiĝi kaj samtempe aperas novaj problemoj, mi decidis iujn hobiojn limigi aŭ tute fini. Sed adiaŭi mi volas digne kaj solene. Lastfoje ascendi sur la pinton de mia ŝatata monto aŭ boatveturi riveron, sur kiu mi eklernis stiri boaton, estas facila ideo, sed kiel adiaŭi Esperanton? Kvankam mi praktikis tiun ĉi lingvon la tutan vivon kaj havis multege da kontaktoj kaj renkontiĝojn kun esperantistoj, mi neniam vizitis UK eksterlande. Do, kiel donacon al la 60-a naskiĝdatreveno mi decidis

ĉeesti la UK en Lisbono, mian unuan, kaj kiel mi pensis, lastan kongreson.

Kiam mi ĉe la praga flughaveno renkontiĝis kun esperantistoj ĉirkaŭ Lenka Angelová, kiu organizis la karavanon al la UK, mi tuj antaŭsentis, ke mi estas en bonaj manoj. Amikema kaj afabla etoso daŭris la tutan kongreson, kiu estis tre eminenta! Pli aĝaj homoj ĝenerale timas malsanojn, maljuniĝan korpon, mankon de vivrimedoj, sed preskaŭ neniu pensas pri deficito de vitala elano kaj bezonata vivenergio.

Kaj ĝuste da energio kaj elano mi ricevis plej multe. Interesaj prelegoj, eminentaj koncertoj, propagando de Esperanto sur lisbona placo per la plej granda movebla kariljono de la mondo kaj futbalmatĉo de esperantistoj kontraŭ loka lisbona teamo apartenas al neforgeseblaj travivaĵoj. Fakte mi devas sincere konfesi, ke dank´ al ĉiuj kongresaj eventoj mankis tempo por la belega Lisbono.
Jam dum la kongreso mi eksciis, ke Esperanto certe ne estas la hobio, kun kiu mi adiaŭos ĉi-jare kaj kiel pruvo mi jam kolektas informojn pri la UK en la finnlanda Lahti. Jiří Caletka

La 103-a UK en suda Eŭropo en Portugalio

La supre skribitaj artikoloj de partoprenintoj la kongreson laŭdas, sed ĝi min nunjare ne ravis. Tiu ĉi estis mia kvina kongreso kaj mi povas diri, ke la plej malbona. Eble estas miaj impresoj influataj de la plej belega kongreso en la slovaka Nitra

pasintjare, kie estis ĉarma organizaĵo, Lisbono ne povas al ĝi konkuri. Ĉi tie estis malmulte da helpantoj, neniu informejo, neniu ion sciis, mankis poŝtŝtampilo por la kolektantoj, aŭ iaj memoraĵ-objektoj, absolute neniu propagando pri Esperanto en la urbo. Por la tagkuriero, en kiu ni povis esti informitaj pri aktualaĵoj kaj tagaj ŝanĝoj, ni atendis ĝis vespero.

Kulturaj programoj estis nur koncertoj, kelkaj tiel laŭtaj, ke ni devis forlasi la salonon. La klimatizaĵo aŭ eblo aerumi mankis, la prelegĉambroj estis tro plenaj de personoj kaj tiel por ni jam nealireblaj. La gvidantoj ŝanĝis la lokon por kelkaj programoj kaj kiam ni sukcesis trovi la novan lokon, mallongiĝis la tempo de la programo. Ankaŭ tio ne plaĉis al ni, ke la solena inaŭguro kaj nacia vespero okazis ĉe alia fino de la urbo, kien ni devis mem veturi per metroo per propra mono.

Ankaŭ dancbalo kaj bankedo okazis sur alia loko, kie eĉ ne estis urba trafiko kaj la homoj devis uzi taksiaŭton. Do unuafoje mi ne partoprenis dancbalon de UK. La movadan foiron mi trakuris tre rapide pro nespirebla medio. Mi ĝojis, ke ĉi-foje mi ne mendis tablon por propagandi nian organizaĵon AEH.

En tiu ĉi UK ne estis tiom da kongresanoj kiel en la franca Lillo, do ni renkontis geamikojn pli ofte, kio iom egaligis mankojn de la organizaĵo. Mi opinias, ke plej bela travivaĵo estis la tuttaga ekskurso al Sintra, Cabo da Roca kaj Cascais, kiun mi organizis helpe de vojaĝagentejo por 29 ĉeĥoj kaj 5 poloj. Post bonega tipa portugala tagmanĝo ni haltis sur sovaĝa plaĝo, por ke ni

trempadu la varmegajn piedojn en malvarmega akvo de Atlantika oceano, sed granda ondo malsekigis eĉ niajn subajn tolaĵojn. Tamen danke al la varmego ni baldaŭ sekiĝis.

Lisbono estas bela urbo, sed se ni volus ĝin pli bone trarigardi, ni ne povus partopreni la UK. Tamen ni vidis la plej konatan parton ĉe la river-enfluejo Taĵo kun venk-arkaĵo, la burgon kaj stratetojn, kiujn krucigas la historia tramo.

Ni vizitis ankaŭ la plej malnovan parton de Lisbono, Belém, de kiu eknavigis marnavigistoj. Ni ankaŭ gustumis lokajn specialaĵojn. Tamen pri Lisbono mi ne havas tro belajn rememorojn, ĉar mi havis grandajn problemojn pri certigita kaj antaŭpagita tranoktado por kelkaj partoprenantoj kaj krom tio mia edzo estis priŝtelita je ĉiuj dokumentoj kaj mono, do li devis trakti en policejo kaj ambasadejo.

Lenka Angelová

Nia ĉeĥa grupo en aerodromo

Biciklado laŭ la rivero Bečva 25.8.2018

Mateno de la tago ne estis por biciklado tro favora, ĉar venis pluvo, sed ĝia denseco ne estis forta kaj ni havis eblon renkontiĝi kaj bicikli.
Dum la pluvo ni vizitis la urbon Valašské Meziříčí, kie estas restaŭrita kastelo kaj ankaŭ la urboplaco aspektas bone. Poste ni ekbiciklis al la kunfluejo de la rivero Bečva ĉe Rožnov kaj Vsetín. Ĉi tie ĉesis la pluvo kaj la vetero por biciklado pliboniĝis.
En Hustopeče ni povis admiri nove restaŭritajn kastelon kaj interesan preĝejon. Ĉe la urbeto troviĝas ankaŭ la ripozejo Lagoj de Hustopeče.

Alia interesaĵo atendis nin en la najbara vilaĝo Skalička. Venta muelejo konstruita en la jaro 1820, sed transportita al Skalička en la jaro 1850. Ĝis nun ĝi estas kapabla mueli. Proksime ni trovis gastejon.
Post refreŝiĝo ni veturis malsupren al la banloko Teplice nad Bečvou, kie krom mineralfontoj kaj bandomoj estas du interesaj lokoj. La tiel nomata Karsto de Hranice ne estas granda, sed interesa; la unua interesaĵo estas Aragonitaj grotoj, kiuj estis kreitaj de mineralakvo de malsupro supren.



Dua interesaĵo estas la Abismo de Hranice, kie ĝis nun esploristoj atingis profundon de 404 metroj.

La plej granda parto de la abismo estas sub la akvo kaj la videbla (seka) parto estas profunda 69 metroj. El la loko ni biciklis en la urbon Hranice, kie oni havas kastelon uzatan kiel urbodomo, kun vitrita korto. Hranice, nun bela urbo, estis fama por Armea akademio.
La sekvaj interesaĵoj estis teknikaj kaj fervojaj. Multe amuzis nin vizito de forlasita fervoja tunelo ĉe Slavíč, kiun ni traveturis. Proksime de la tunelo troviĝas alia fervoja interesaĵo. Viadukto de Jezernice, konstruita en la jaro 1846, kiu estas riparita kaj nokte lumigata. Post tio ni revenis al la rivero Bečva kaj trovis ponteton, kiu estis dum granda inundo en la jaro 1997 tute detruita.

Por ni esperantistoj estas tre interese, ke la riparo de la ponteto estis subtenita de la nederlanda urbo Voorburg, kie lokaj esperantistoj havis tre bonajn rilatojn kun esperantistoj el la urbo Hranice. Dank´al esperantistoj el du urboj staras ĉi tie nova bela ponteto kaj ni povis uzi ĝin.
Bicikla pado daŭre gvidis nin sub la burgon Helfštýn, kie estis festo de forĝistoj, kaj proksimigis nin al nia celo, al la simpatia urbo Lipník nad Bečvou. Ni ĝojatendas la venontan jaron, kiam ni renkontiĝos sur alia loko. Ladislav Hakl

El la redakcio :

Karaj legantoj,
proksimiĝas la fino de la jaro kaj nia redakcio preparis por vi post longa tempo literaturan konkurson pri temoj, el kiuj vi povas elekti:

1) miaj rememoroj je Kristnaskotempo el mia infaneco
2) kiel mi travivis pasintjarajn Kristnaskojn

3) kial mi jam ne ŝatas festojn antaŭ la fino de la jaro
Bonvolu skribi laŭ eblo sur komputilo, aŭ sur skribmaŝino, aŭ se via skribaĵo estas facile legebla, do ankaŭ mane.
Premioj: 1/ diplomo kaj libro elektita el 5 libroj
2/ diplomo kaj libro elektita el 3 libroj
3/ diplomo kaj pli malnova E-lernolibro

Ĉiuj tri pritaksitaj artikoloj estos publikigitaj en Informilo aŭ en Antaŭen. Viajn konkurslaborojn bonvolu sendi al nia redakcio ĝis la 10-a de novembro 2018.

Trista anonco:

Nia nederlanda membro J. M. van der Hoeven el la urbo Lopik (*17.6.1928) forpasis la 18.8.2018, kiel dum septembro skribis al ni lia filino.
Honoron al lia memoro! red.

INFORMILO – monata gazeto por esperantistoj-handikapuloj + suplemento **ANTAŬEN**
Eldonas AEH – Asocio de esperantistoj-handikapuloj en Pardubice
Redaktoroj: Jarmila Rýznarová, Ludmila Srbová
Adreso: Svaz zdravotně postižených esperantistů, Na Okrouhlíku 953/21,
530 03 PARDUBICE, CZ tel. **466 611 941**
e-mail: **aeh@esperanto-aeh.eu** interreto: **www.esperanto-aeh.eu**
Banka kunligo: Fiobanko, kont-numero de AEH 2801322017, bank-kodo 2010
Bankovní spojení: Fio banka , číslo účtu AEH 2801322017, kód banky **2010**
IBAN: CZ3520100000002801322017 SWIFT/BIC: FIOBCZPPXXX
La jarabono de Informilo **20 €** (en kovertoj), aŭ 10 € (e-mail)
Roční předplatné Informila **300,-Kč** (v obálkách), nebo 150,-Kč (v e-mailu)
Při platbách vždy uveďte vaše členské číslo (naleznete nad vaší adresou) jako variabilní symbol! Příspěvek svazu AEH v dobrovolné výši.
Kotizo por AEH propravola. Kodo ĉe UEA: aehk-z
La redakcio ne ĉiam havas la saman opinion kiel la aŭtoroj de la artikoloj.